La Komitato de TEJO, 24a de julio 2009, Liberec (65a IJK)

La TEJO-Komitato rekonas la neceson evolui strategiojn por pli efike atingi la kreskantan komunumon de retaj Esperanto-uzantoj kiuj ne membriĝas al LA-oj resp. TEJO/UEA. Tamen, la TEJO-Komitato kontraúas la enkondukon de nova membrokategorio malaltkotiza, sen paperaj dissendoj, kaj sen rajto je membrorabato ĉe UK/IJK, se ĝi ne estas parto de larĝa strategio rilate al la reta agado de TEJO/UEA. Ni emfazas ke TEJO evidente estu plene envolvita en ĉiuj diskutoj implikantaj ŝanĝojn por membroj de TEJO kaj/aú ĝenerale tuŝas la strukturon de la organizo.

Ni bonvenigas kaj rekomendas ke TEJO/UEA komune profunde elaboru strategion por reta agado, uzante la spertojn akiritajn de E@I, FS de TEJO, kaj de diversaj ekzistaj retprojektoj, ĉar tia strategio (kaj ne simple nova membrokategorio) estas nepre bezonata por atingi la „retajn Esperantistojn“.

Cetere, ni instigas al pliaj diskutoj rilate al reformo de la kotizsistemo, kiun ni taksas nenecese komplika. Ni supozas ke pli klara, modula kotizsistemo povus faciligi la aliĝon por junaj Esperantistoj. La neceso sendi paperan ekzempleron de la jarlibro al ĉiuj junaj membroj ne estas evidenta por ni kaj estu opcia ĉe aliĝo (kun malplialtiga influo al la kotizo).